

De Beaufront, enigmo en la historio de Esperanto, laŭ Tazio Carlevaro, 2.
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 695, 1977.02.02 & 04 & 05

Cl.- Parolas Claude Gacond. La pasintan semajnon ni legis al vi la komencon de artikolo de Tazio Carlevaro, kiun aperigis Literatura Foiro en junio 1976. Temas pri studo pri la personeco de Louis de Beaufront. La franca esperantisto Jossinet malkovris, ke la markizo de Beaufront Pierre Josselin G  rald Eug  ne Albert Louis, fakte neniam naski  gis en Parizo la 3-an de oktobro 1855. Tazio Carlevaro opinias, ke Louis Couturat malkovris tion   i kaj tiel povis ludigi al la papo de esperanto pajlohoman rolon okaze de la Delegacia afero en 1908, kio klarigas, kial de Beaufront akceptis ludi malla  dindan rolon de fu  -advokato de esperanto profite al la lingvo-projekto Ido de Couturat.

Jen da  rige mi legas al vi erojn el la artikolo ‘La enigmo de Beaufront’ de Tazio Carlevaro: «Louis de Beaufront estis tiel misterema, tiel sekreta, kaj liaj biografiaj informoj estis tiel malprecizaj, ke estis nature, ke liaj amikoj brodu lian vivon per ora kaj ar  enta fadenoj. Tute certe li inventis sian nomon, sian titolon, la teologi-studojn en Leuven (Louvain), sian voja  on al Hindio, en Benares en 1872-74, sian malbon  sancon: li rakontis, ke li estas el ri  a nobela familio kaj, revenante el Benares, surmare, dumtempeste, ke la   ipanoj enmarigis, por malpezigi la   ipon, anka   la kofrojn kun   iuj liaj ri  a  oj, sian restadon en Anglio (1870-76), kie li estus studinta lingvistikon   e Max M  ller, ktp. Kompreneble liaj amikoj inventis la reston: oni susuris, ke li devenas el iu Borbona famili-bran  o, ke li studis en Beograda jezuita lernejo, ke li estas domenikano, a   eble doktoro pri domenikana teologio, ke li estas poligloto: li parolus anka   la anglan, la germanan, la italan kaj la hungaran. Unu el liaj inventoj plej interesaj estas la lingvoprojekto Adjuvanto. Li   iam asertis, anta   sia idisti  o, ke li plene ellaboris tiunoman lingvoprojekton, kiam li ekkonis Esperanton. Tiam li forlasis la sian,   ar li konsideris Esperanton pli bona.» En 1908 li publikigis unu frazon en tiu lingvoprojekto, kiu tamen estas tiel simila al Ido, ke Tazio Carlevaro opinias, ke: «oni povas dubi pri la aserto de la markizo.»

Tazio Carlevaro finas sian artikolon provante doni provizoran respondon al la demando: Kial de Beaufront konsentis esti pajlohomino de Couturat? Ni citas: «Sendube la karaktero de de Beaufront (lia problemaro) permesis, ke li funkciu kiel pajlohomino. Sed sendube estas io plia: probable Couturat sciis lian veran vivon, kaj li trudis tiun rolon al li. Ekstera cirkonstanco, kaj interna preteco: en tio ku  sis la tragedio de de Beaufront.»

Pri la vera infaneco de Louis de Beaufront oni nun scias tion   i. Ni da  re citas Tazion Carlevaro: «La patrino de Louis de Beaufront nomi  gis Louise Armand Chevreux. Lia patro estas nekonata, sed oni scias, ke la patrino povis vivi pro rento, kiun pagis iu sinjoro Courtenay, ne nobelo, kiu do estis ver  ajne la patro de la infano. Lia patrino venis el popola familio. La infano estis do ekster-le  a. Li naski  gis la 3-an de oktobro 1855, kaj oni baptis lin la 9-an de la sama monato : Louis Eug  ne Chevreux. Li vivis kun sia patrino en vila  o, Courtry, kie lia patrino mortis en 1867. Li do estis 12-jara. La infano estis malsanema kaj sciis apena   legi en tiu epoko. Sed en 1869 li komencas la lernadon pri filozofio, kaj en 1873 li licenci  gas. Li mem asertas, ke en 1875 komenci  gas lia interesi  o pri lingvistiko. En 1876 li licenci  gas pri beletristiko. En 1877 komenci  gas lia kariero kiel pedagogo. En 1888 li estas en Antibes kaj li legas en ‘Le rire’ pri Esperanto. Ver  ajne lia memoro perfidis lin,   ar en tiu jaro, en Le Rire, aperis   e ne unu mencio pri Esperanto.

Jam en 1892, en Epernay, li aperigas la unuajn tekstojn pri Esperanto kaj en Esperanto. Kaj li konatiĝas kun la sola homo, kiun oni povas difini lia amiko: René Lemaire. Fine, en 1899 li fondas la revuon L'Espérantiste.»

Ni lasas al vi la plezuron malkovri, kio okazis al li post lia transiro al Ido en 1908. El tiu ĉi konkludo ni nur citas tiun ĉi emociigan eron: «Ĉu de Beaufront bedaŭris sian transiron al Ido? Probable jes, ĉar en siaj lastaj jaroj li aperigis en sia bulteno tri poemojn en Ido (pri kiuj li asertis, ke la aŭtoro estas li), kiuj estas nenio alia ol traduko de La Espero, La Vojo kaj la Preĝo sub la Verda Standardo de Zamenhof. En tipe De Beaufront-a maniero, temas tamen pri la lasta omaĝo al homo amata kaj malamata, kiun li tamen neniam povis forgesi.»

Vi aŭdis el Svislando erojn el artikolo pri 'La enigmo de Beaufront' aperinta en Literatura Foiro en junio 1976. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*